

ESPERANTISTO

ESPERANTYSTA POLSKI

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO KAJ EKSTERLANDE
MIESIĘCZNY PRZEGŁĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE I ZAGRANICĄ

ELDONANTO POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO
WYDAWCZA

REDAKTANTOJ PROF. DR. ODO BUJWID — TAD. HODAKOWSKI
REDAKTORZY

APERAS LA 1-an DE CIU MONATO. REDAKCIAN MATERIALON ONI PETAS SENDI
GIS LA 20-a DE CIU MONATO.

*30-datreveno de l' scienca laborado de la Prezidanto
de Pola Respubliko, Prof Ignacy Mościcki.*

La 7-an de decembro 1934 tuta Pol-
lando solenis 30-an datrevenon de sia
estiminda reganto, prof. Ignacy Mościcki.

Prezidanto Mościcki -
laŭ la profesio inge-
nerio de hemio - fi-
ninte la studojn en la
Riga teknika altlerne-
jo kaj publikiginte
sian unuan disertajon
en Jarlibroj de Scien-
cakademio en Kra-
ków, forveturis kaŭ-
ze de persekutoj de
la rusaj aŭtoritatoj al
Londono, laborante
same fake kiel socie;
nome li aktive par-
toprenas en la laboro
pri sendependigo de
l' lando. Translokinte
siajn preferojn scien-
cajn el la fako de l'
hemio en tiun de l' fi-
ziko, li akiras en 1897
j. postenon de asista-
nto ĉe katedro de l'
fiziko de prof. Wie-
rusz - Kowalski en la
katolika universitato en la svisa Freibürg.
Tie talento kaj genio de l' esploristo
kaj organizanto povis ekbrili en tuta
pleno.



La scienculojn de tiu tempo interes-
la problemoj pri ricevo de l' azoto el la
aero kaj plua ĝia aliformigo je produktaĵoj

valoraj same por agri-
kulturo kiel por indu-
strio. Tiu temo oku-
pas ankaŭ prezidanton
Mościcki, kiu prilabo-
ras metodojn kaj apa-
rataron por produkti
densigitan azotan aci-
don senpere el la a-
zoto de l' aero. En j.
1901 fondiĝas kompa-
nio kun kapitalo plej-
parte pola, ekspluata-
nta la patenton de
prez. Mościcki, por
fabriki azotan acidon
el la aero; ekestas la
fabrikoj en Freibürg,
Vevey, Chippis — ĉi
lasta kun partopreno
de svisa kapitalo, kaj
en j. 1910 oni enmer-
katigis unuan cister-
non da azota acido,
fabrikita el la aero.

Kun fabrikado de l' a-
zota acido ligas sin ankaŭ laboroj por ri-
cevi cianan acidon kaj salojn de ĝi fa-
brikatajn; por kies produktado prez.
Mościcki funkciigis en jaroj 1915/17 fa-

brikon en Bory apud Jaworzno (Krakova vojevodio).

La ricevado de l' azoto el la aero estas unu el fakoj de l' estiminda Jubileo. Alia sfero estas laboroj en fakoj de elektrohemio kaj elektrotekniko. Rezulto de plenkaj kaj ofte tre danĝera laborado estas konstruo de forno kun turniganta elektra flamo, tuta aro da kondensatoroj, aparataroj por kurentoj de alta tensio ktp.

De jaro 1912 laboras prof. Mościcki en la lando kiel profesoro de fizika hemio kaj elektrohemio en la teknika altlernejo en Lwów. Li okupiĝas en unuaj jaroj de l' granda milito per bituma industrio, precipe li esploras emulsion de nafto, tergaseojn kaj studas eblojn de aligo de nafto. Li akiras aron da patentoj en ĉiuj tri fakoj de sia laboro. En j. 1922 ekestas iniciate de prez. Mościcki kaj kun lia financa subteno Ĥemia Esplor-Instituto en la Varŝava kvartalo, Żoliborz. Tiu instituto donas eblon de laboro al junaj polaj Ĥemiistoj en scienca kaj teknika fakoj. Sur la teritorio de Polujo 3 grandaj fabrikoj kompleksoj laboras laŭ patentoj de prof. Mościcki en fako de produktado de azotacido el la aero, amoniako ktp., nome la fabrikoj en Chorzów, Jaworzno kaj Mościce. Tiuj fabrikoj posedas grandegan signifon por nia agrikulturo kaj industrio. Sur sciencaj esploroj en fako de bitumoj bazas sin la ŝtata fabriko Polmin en Drohobycz.

Krom la laboro pure scienca prez. Mościcki fariĝis konata kiel bonega organizanto. La pola socio bone memoras tiujn momentojn, kiam Poloj laŭ decido de la Versajla packontrakto transpre-

nis la fabrikojn en Chorzów kiel posedojn de l' ŝtato: 196 inĝenieroj - Germanoj forlasis subite la postenojn, bruliginte planojn de l' fabriko kaj de aparataroj. Malgraŭ senesperigo de siaj kunlaborantoj, prof. Mościcki ne nur, ke ne senkuraĝiĝas, sed, baldaŭ orientiĝinte en planoj, elmontras konstruarojn de l' tuta aparataro, plibonigante elektroformojn por produkti karbonan cianamidon kaj absorboturojn.

Laborkunuloj el la Freiburga periodo karakterizas prezidanton Mościcki kiel homon kapablan venkbatali la plej grandajn malfacilaĵojn. Prof. K. Dziewoński, finante sian paroladon dum la solena akademio en la Krakova universitata salonego por honorigo de prez. Mościcki, memorigis tiujn momentojn, kiam la prezidanto, kiel juna esploristo, starante sur por-izola seĝo kaj malfermante kurentalfuon al aparatoj, impresis kiel boatdirektisto, troviĝanta antaŭ la minaca elemento. Kolegoj tiam esprimis aserton, ke li stas homo, kiun atendas grandaj taskoj.

De l' jaro 1926 la sorto starigis lin ĉe direktilo de la pola ŝtato. En la tago de lia jubileo la tuta pola socio prezentis al li bondezirojn de la plua fruktoplana laborado por organizo de l' scienco kaj tekniko en Pollando, esprimante sian rekonon kaj simpatian al la sciencisto kaj homo dum multaj solenaj kunvenoj kaj akademioj, kaj ankaŭ emnavigante al sia unua civilano memolibron pere de tulpola komitato por festi 30-an datrevenon de lia scienca laboro sub honora gvidado de marŝale Józef Piłsudski.

Dr. Wanda Koczorowska.

EL INFANAJ JAROJ DE MARSALO PIŁSUDSKI.

I.

Józef Piłsudski naskiĝis la 19-an de marto 1867 en Zułów, proksime al Vilno, en bieno de siaj gepatroj. Bela estis ĉi tiu vilaĝo kaj bela ankaŭ estis la tuta ĉirkaŭaĵo de ĝi. Proksime al ĝi etendiĝis la densa arbaro kaj antaŭ ĝi verdiĝis printempe fruktdonaj kampoj. En ia valo ĝaje flustris la rivereto kaj ambaŭflanke de la larĝa ŝoseo kreskis la blankaj betuloj. Inter ĉi tiuj verdajoj staris bela vilaĝo domo de gesinjoroj Piłsudski.

La gefratoj de Marŝalo konsistis el kvin knaboj kaj du knabinoj. Inter ĉiuj la plej grava persono estis la 9-jara „Ziuk". La fratoj opiniis lin sia komandanto. La servo sub li ne estis facila.

La militekzercoj okazadis ne nur dum la tago, sed ankaŭ dum la nokto. Precipe la lastaj estis por la fratoj tre enociaj. Al ĉi tiuj noktaj ekzercoj la komandanto Ziuk kunvokis la fratojn, kiam la plenaĝuloj jam bone dormis en la tuta domo.

II.

La komandanto de la malamika militistaro estis sinjorino Cecilio, kiu dormis en la aparta ĉambro. Iufoje la juna komandanto sendis tien unu el siaj fratoj, por ke li, kiel patrolo, eksciu, kion faras la malamika komandanto. Kiel pruvo, ke li plenumis la ordonon, li devis reveni kun ŝia ŝlosilaro, kuŝanta sur la nokta tableto, apud la lito de sinjorino Cecilio.

Laŭ via ordono, sinjoro komandanto!
— diris la frateto. Li forlasis sian varman liteton kaj iris tra la noktaj mallumoj. Liaj piedetoj tremis pro timo.

Longe daŭris, kiam li fine trovis la pordon al la ĝepatra ĉambro, kiun oni devis trairi por atingi la celon. Li voĉis malfermi la pordon senbrue, delikate. La pordo tamen iomete ekknaris. Felice neniu tion ekaŭdis. Al la malalta patrolo ŝajnis, ke el ĉiuj flankoj insidas lin en mallumoj la minacaj danĝeroj. Spite denove ekkrakis la planko. La patro ekmoviĝis en la lito. La patrolo retenis la spiron. Sed la patro ne vekigis. Refoje ekregis silento, sonoranta en oreloj.

La patrolo estas fine apud la pordo de la malalta komandanto. Li alprenis kuraĝon. Subite... krako, kvazaŭ la plafono falegus sur la plankon! Jen la seĝo renversiĝis. La ĝepatroj elsaltis el la litoj. Malfelice! La patrolo forkuras kiel eble plej rapide al sia varmeta litero. Ho, kio sekvis poste!...

III.

Ne ĉiam la noktaj ekzercoj tiel malbone finiĝis. Iun nokton la komandanto Ziuk forsendis alian frateton kun la sama ordono. La nova patrolo longe ne re-

DRO MARJAN TYROWICZ (Lwów).

La pola gazetaro, ĝia pasinteco kaj la nuna stato.

La pola gazetaro ludas en disvolvado de la lando rolon same gravan, kiel en aliaj modernaj socioj. Karakteriza trajto en ĝia disvolvado estas tio, ke kiam dum la XIX jrc. ĝi posedis karakteron plej ĉefe edukan kaj kulturan - pioniran, de post la granda milito pligraviĝas en ĝi momentoj politikaj kaj ekonomiaj. La simpla kaŭzo de tiu fenomeno estis la fakto de l' politika mallibero kaj de subpremo de la pola intelektularo, kiuj elvokis kiel reakcion — levadon de l' nacia spirito ĝuste pere de la gazetaro. La pola gazetaro en periodo de l' mallibero des pli diligente okupadis sin per nacia verkado sur kampoj de l' arto kaj scienco, ju pli la ekonomia vivo estis sufokata de administracio de l' konkerintaj ŝtatoj. Radikala ŝanĝo, kunligita kun reestigo de l' pola ŝtato, turnis interesiĝon de plejparto de pola socio al ekonomiaj problemoj. — kaj bezonoj de l' renaskiĝinta ŝtato kaŭzis laŭsekve ekeston de nombrega gazetaro politika.

La pola gazetaro povas fieri pro tiu fakto, ke el ĉiuj slavaj landoj ĝi posedas la plej malnovajn komencojn, kaj ĝia ĝusta genezo ligas sin kun grandioza

venadis. Fine, post duono da horo li revenis, portante fiere la ŝlosilaron de sinjorino Cecilio.

— Terure mi timis! — konfesis la venkinto.

— Tini estas permesite — instruis lin la komandanto. Sed krom timo vi montris ankaŭ la bravecon kaj ĉi tio estas la piej grava. Vi montriĝis bravulo.

Kaj la komandanto alpinglis al la nokta ĉemizeto de la venkinto ordenon, kiun li mem dum la tago bele eltrancis el ora papero.

La 9-jara komandanto Ziuk fariĝis poste la unua Marŝalo de Polujo. Józef Piłsudski venkis en gravaj bataloj multajn malamikojn. Ofte en sia vivo li elsendadis noktajn patrolojn kaj la ordenojn li alkradadis al la brustoj de multaj armeestroj kaj de multaj, multaj polaj soldatoj, kiuj montris sian bravecon.

Nun estas Marŝalo Piłsudski por Poloj simbolo de senlaca kaj sindona laborado por la bono de l' patrujo. Kaj ili vere agas tiel, kiel li solene proklamis en vortoj de sia iama artikolo: „Venas tempo, kies eco estas velkuro de la laboro, kiel antaŭe estis velkuro de la sango, kiel antaŭe estis velkuro de la fero!”

Trad. prof. Sygnarski.

ekfloro de l' eŭropa kulturo en XVI jrc. Tamen jam en mezepoko la monaĥejoj en Polujo plenumadis kvazaŭ rolon de hodiaŭaj jurnalagentejoj. Ĉar jen la monaĥoj aŭ por sia propra scio aŭ pli ofte por siaj fondintoj kaj protektantoj notis informojn pri iom gravaj okazajoj, pri kiuj sciigoj venadis al iliaj muroj, poste tiujn manskribitajn informojn ili dissendadis al siaj bonfarantoj, ricevante de ili jam por tiu kompenzo ĝis cent dukatoj jare. Ĝi estis aĉbonprezo efektive tre alta. Pri ekzistado de tiuspecaj interesaj originoj de l' gazetaro en Polujo — atestas konservitaj ĝis nun en Jagellona Biblioteko en Krakovo manuskriptaj ekzempleroj de similaj eldonoj, memkompreneble en latina lingvo. La XVI jrc. ĝuste nomata „ora periodo de l' pola literaturo” alportis pluan disvolvon de l' latina gazetaro sur niaj teroj. Favoris ĝian disvolvon karakteriza por tiuj tempoj turniĝo al publicismo socia kaj politika. En XVII jrc. krom periodaj latinaj presajoj ni renkontas jam ankaŭ polajn, aperantajn kutime sub nomo „Raportoj”, „Avizoj”, „Novajoj” aŭ „Priskriboj”,

krom tiuj komencas aperadi presajoj en lingvoj germana kaj itala. Eĉ dum militaj ekspedicioj ne malofte estis presataj t. n. „lendaraj sciigoj“.

La plej konata tiutempa presita periodaĵo estis „Merkurio pola“ eldonata de l' j. 1661 en Krakovo, enhavanta notojn el Vien, Stockholm, Roma, eĉ el Madrid kaj Lisboa, kiel kronikon de interesaj aktualaĵoj. Tial oni ĝenerale opinias tiun presadon la unua pola ĵurnalo en moderna signifo. Plua disvolvo de l' gazetaro en Polujo, ne unufoje bremsata per militaj okazaĵoj, marŝis tamen persiste antaŭen. En XVIII jrc. ĝi akceptas jam specialan karakteron, sur kiu forte markigis anglaj influoj, precipe de du gazetoj, aperantaj de komenco de tiu jarcento: „The Tatler“ kaj „The Spectator“, redaktataj de Steel kaj Addison. Laŭ ilia modelo polaj monaĥoj piaroj komencis eldonadi Polan Kurieron en 1729, kiu akiradis ĉiam pli viglan popularecon. En tempoj de l' lasta pola reĝo Stanisław Aŭgusto Poniatowski nombro da organoj kaj legantoj subite kreskis grandioze. Krom ĉiutagaj ĵurnaloj, kiel „Monitor“, „Memorlibro Politiĉa kaj Historia“, „Ludoj Agrablaj kaj Utilaj“, redaktataj de la plej eminentaj literaturistoj de tiu periodo, ĝi tamen subtenon de l' reĝo, komencis sian vivon la ekzistanta ĝis nun plej malnova gazeto pola, nome „Gazeta Warszawska“ (Varsovia gazeto), aperanta ek de 1774 j.

Tiun brilan komencon de l' pola gazetaro haltigis la dispartigo de Polujo, disigo de l' nacio je tri provincoj, fine longjaraj militoj Napoleonaj.

Post la viena kongreso en 1815 j. la gazetaro reviviĝas tre prospere, pri kio atestas nombro de 170 periodaj eldonaĵoj en dekkvinjaro de 1815 ĝis 1830. En Varŝavo, ĉefurbo de Kongres-Polujo, kie centrigas politikaj instancoj kaj seĝoj de tiu parto de Polujo, komencas aperadi de l' jaro 1821 dua el la plej malnovaj hodiaŭaj ĵurnaloj en Varŝavo, nome „Kurjer Warszawski“. Polaj insurekcioj en 1830/31, 1846 kaj 1863/4 kaj reakcio de rusa registaro post ĝia silentigo kaŭzis tian subpremon, ke pri disvolvo de politika gazetaro ne povis esti parolate. Nur kelkaj ĵurnaloj aperadis en aŭstria Polujo, el ili oni devas citi kiel plej malnovan el hodiaŭaj lvovaj gazetoj, ĉar de 1811, j. eldonatan: „Gazeta Lwowska“ (gazeto Lvova). Ankaŭ en Poznań oni presis kelkajn organojn. Elmiĝrintaro pola post la novembro insurekcio (1830), precipe en

Francujo, Belgujo kaj Anglujo estigis tie apartan gazetaron kun gvidvortoj decide demokratiaj kaj socialistaj, sed la vivo de tiuj organoj estis plejparte tre mallonga.

Nur finaj jaroj de XIX jrc. kaj revolucia movado en Kongres-Polujo kaj Rusujo en 1905 kontribuis al brila kresko de l' pola gazetaro, kiu malgraŭ sinapogo je politikaj partioj estis provizata de la plej eminentaj poetoj, romanverkistoj kaj klerigaj aguloj, tiel, ke problemoj de l' nacia kulturo elŝovis sin sur unuan lokon. En tiuj jaroj plejparte komencis sian ekziston aperantaj ĝis nun plej seriozaj ĵurnaloj polaj.

La gazetaro de l' renaskiĝinta ŝtato posedas siajn kadrojn leĝo-organizaĵajn en pola gazetara leĝaro, publikita la 10-an de majo 1927 kiel dekreto de l' ŝtatprezidanto. Ĉiuj ĵurnalistoj sur teroj de renaskiĝinta Polujo estas organizitaj en ĵurnalistaj sindikatoj, sur kies fronto staras Asocio de Ĵurnalistaj Sindikatoj de Polujo, kiu mem estas ano de Internacia Federacio de Ĵurnalistoj (Federation Internationale des Journalistes). Ligilo inter la pola gazetaro kaj tiu eŭropa estas krome telegrafaj agentejoj ŝtataj kaj privataj, plejparte kun sidejo en Varŝavo. Ŝtata agentejo estas PAT (Pola Agentejo Telegrafa), multe pli nombraj estas tamen agentejoj privataj, kiel iama Agentejo Orienta, Agentejo Telegrafa Express (ATE), „Iskra“ (Fairero), Katolika Agentejo Gazetara (KAP) kaj multaj aliaj.

Grandajn gazetarkompaniojn en Amerika stilo an en tiu okcident-eŭropa, Polujo ne posedas multajn. Tia karaktero posedas eldonaĵoj de „Ilustrowany Kurier Codzienny“ (Ilustrita Kuriero Ĉiutaga), eldonata en Krakovo kaj „Prasa Polska“ (Pola Gazetaro) en Varŝavo. Ili posedas proprajn kelketaĝajn domegojn, provizitajn per la plej modernaj maŝinaj arandoj, proprajn staciojn radiotelegrafajn kaj bonege organizitan kolportadon.

Kunlaborantoj de l' pola gazetaro - simile, kiel en Francujo - devenas el preskaj ĉiuj profesioj, precipe el vicoj de politikistoj, literaturistoj, universitatanoj kaj ekonomiaj sferoj. Homoj, vivantaj nure el redaktado, estas relative ne multaj, ĉar ekster ĉefaj postenoj ĝenerale ili ne posedas sufiĉajn materialajn rimedojn kaj ilia laboro ne estas protektata de speciala leĝaro tiugrade, kiel tio okazas ekz. en faŝista Italujo. Malgraŭ tio ĉiam pli populara fariĝas ĉe ni

jurnalisto profesia, tiom pli, ke de l' jaro 1917 ekzistas en Varŝavo Supera Lernejo Porjurnalista, kiel instituto privata. Ankaŭ ĉiam pli bele disvolviĝas sciencaj esploroj pri la gazetaro, nome statistikaj, historiaj, bibliografiaj kaj sociologiaj, ĉiam pli ofte organizataj ekspozicioj ĉe ni kaj alilande ilustras disvolvon le l' pola gazetaro.

La gazetaron en Polujo oni povas dividi je tiu pola kaj tiu de alinaciaj minoritoj. Alilingva gazetaro, ne kunligita kun tiuj minoritoj, ekz. franca kaj angla estas tre malgranda kaj limiĝas pliparte per fakaj periodaĵoj.

La ĉiutaga pola gazetaro posedas karakteron eminente politikan, kaj la perioda gazetaro, do: revuoj semajnaj, monataj kaj kvaronjaraj ankaŭ karakteron literaturan, sciencan kaj fakan. Da tiom popularaj en anglo-saksaj landoj „magazenoj” Polujo posedas relative ne multe, sed rimarkinde pli multaj estas gazetoj sportaj. La politika gazetaro entenas nur 30% de ĝenerala nombro da gazetoj, sed superegas ilin per grandeco de eldonnombro. Ĉar kiam pli ol 1300 gazetoj nepolitikaj estas presataj jare en 18 ĝis 20 milionoj da ekzempleroj, tiam pli ol 500 politikaj gazetoj estas presataj jare en meznombro 400 milionoj da ekzempleroj. Tamen eldonnombro de unuopaj organoj estas relative ne altaj. Ekster ĉiutaga eldonnombro de „Ilustrowany Kurjer Codzienny” en Kraków, kiu per sia alteco decide distingiĝas de aliaj organoj, meza eldonnombro de pola ĵurnalo hezitas en kadroj de 5 — 25 mil ekzempleroj. Tio dume ne atestas pri tre disvastigita legemo, tamen oni devas konfesi, ke la populareco de ĵurnaloj kreskas ĉiujare, precipe sur tereno de vilaĝoj kaj malĉefaj urboj.

Rilate al politikaj partioj malfacile estas karakterizi la polan gazetaron en liksaĵojn nur ĝenerale orientantajn. Sur unua loko oni devas stariĝi gazetojn de registara tendaro aŭ simpatiantajn al ĝi. Tiuj gazetoj superas sumon de 60 organoj kaj ili estigas grupon plej fortan koncerne la gazetnombron. Al tiuj plej eminentaj apartenas „Gazeta Polska” kaj „Kurjer Poranny” (Kuriero Matena). Iom malpli da ĵurnaloj posedas la Nacia Partio, kiu ne atingas koncerne la kiomon 50 organojn, sed kompanse inter ili estas kelkaj plej malnovaj ĵurnaloj polaj, kiel „Gazeta Warszawska” kaj „Kurjer Poznański”. Konservativa gaze-

taro estas relative tre malforta laŭcifere, sed posedas tre belan tradicion kaj distingiĝas hodiaŭ per alta nivelo ekz. „Czas” (T'empo) en Krakovo. Socialista gazetaro estas pli nombra ol la konservativa, sed krom „Robotnik” (Laboristo) ĝi ne posedas tre malnovan pasintecon, prefere oni povus tion diri pri la popola gazetaro, kiu laŭ nombro de organoj estas proksima al tiu socialista, sed ĝi estas ankoraŭ tre malproksima de satigo de legemo. Komunista gazetaro estas ĝenerale tre mizera, kaj la samon oni povas diri pri organoj de aliaj grupigoj politikaj.

Gazetaro minorita dividiĝas je juda, germana, ukraina kaj blankrutena. Minoritoj tiaj, kiel Rusoj, Litovoj, Ĉeĥoj estas en Polujo tre malnombraj, tial ili posedas maksimume kelkajn organojn kaj ne ĉiutagajn. La juda minorito formas unu el sekcioj en Federacio de ĵurnalistaj sindikatoj en Pollando. Kiomo da ĵurnaloj kaj periodaĵoj judaj eldonataj en lingvoj jida, hebrea, pola kaj germana estas pli ol 140 kun kuna jareldononombro de 50 milionoj da ekzempleroj. Tendonco de multaj ĵurnaloj estas forte cionista, redakta nivelo kelkfoje tre alta, ekz. tiu de Lvova „Chwila” (Momento).

La germana gazetaro estas iom malpli nombra: pli malpli estas 120 organoj en kuna jareldononombro 35 milionoj da ekzempleroj. Tiu gazetaro vivas en idea kuneco kun Berlino. Redakta nivelo ĝenerale estas multe pli alta, ol tiu de organoj de slavaj minoritoj.

Ukraina gazetaro estas relative juna, sed ĝi elmontras rimarkindan swingforton, kiu ne ĉiam kongruas la ĝeneralan nivelon de kelkaj gazetoj. Ĝi posedas nune pli ol 70 gazetojn en kuna jareldononombro de 5 milionoj da ekzempleroj. Rilato al pola politiko estas plejparte malfavora.

Tre malforta laŭkvante, laŭkvalite kaj teknike estas la gazetaro blankrutena, preskaŭ ne posedanta ĵurnalojn. Ekzistas preskaŭ 15 organoj, kuna eldonnombro iom pli ol 1 miliono.

Ekster Polujo la pola gazetaro plenumas tre gravan rolon en vivo de 7 milionoj da Poloj alilande. Idea kuneco inter la pol- kaj alilanda gazetaroj polaj estas nuntempe en komenca fazo, tamen ĝi komencas ĉiam pliprofundigadi spirite laŭ idealaro politika de marŝalo Józef Piłsudski. Idea kunligiĝo de l' tuta nacio, dissemita sur la tuta terglobo, estas unu el la plej grandaj kaj laŭdin-

daj taskoj de l' pola gazetaro. Estas klare, ke multmiliona pola socio tia, kia estas Poloj, ne povas subtaksi la fortegan rolon de anonima potenco, kies

nomo estas: Gazetaro kaj ne povas ne krei same potencon faktoron en vivo propra kaj internacia, kiu nomiĝas: Publika Opinio.

ROLLET DE L' ISLE.

La prezidanto de nia Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio, s-ro Rollet de l' Isle fariĝis ĵus 75-jara. En nomo de la tuta pola samideanaro kaj en nia propra ni prezentas al la estiminda jubileulo varmajn kaj sincerajn bondezirojn de l' plua ankoraŭ multjara kaj fruktedona kunlaborado.

La jubileulo apartenas al la plej aktivaj samideanoj. Lia poresperanta laboro daŭras jam pli ol tridek jarojn kaj ankoraŭ neniam malvigligis la fervoro, kun kiu li laboras por nia ideo. Estus tre malfacile citi multegajn francelingvajn broŝurojn kaj traktaĵojn, kiujn li aperigis por subteni Esperanton. Li ĉiam estas la plej fervora disvastiganto de nia ideo en sciencaj societoj kaj en diversaj intelektaj medioj. Lia argumentado estas ĉiam konvinka, lia stilo ĉiam admirinda.

Li estas por ni modelo de Esperanto-propagandisto.

S-ro Rollet de l' Isle estas ankaŭ konata kiel eminenta scienculo. Jam antaŭ la milito li estis ĝenerala hidrografia inĝeniero de la franca maristaro. De tiu tempo li multe laboradis en Scienca Asocio Esperantista kaj en kelkaj sciencaj organoj, kiuj en Esperantujo aperadis kaj aperadas. Post la morto de s-ro Warden, kiu ne povis multe labori en niaj lingvaj institucioj pro danĝera stato de sia sano, pasintjare oni elektis prezidanto s-ron Rollet de l' Isle, kiu tuj vigle ek-laboris, enkondukante kelkajn salutindajn novaĵojn en la agadmaniero de la institucioj, kiuj en la persono de l' estiminda jubileulo ricevis energian kaj laboremajn gvidanton, kaj ni bonegan modelon de senlaca batalanto por nia ideo.

La Redakcio de Pola Esperantisto.

MARJA SZCZEPAŃSKA.

NOVAJ FLUOJ EN EDUKADO DE VIRINOJ.

Ni ĉiuj observis, kiel la militaj tempoj plilarĝigis la kampon de l' virina aktiveco. La manko de viroj batalantaj kaj mortantaj en tranĉeoj malfermis tre multajn postenojn, ĝis tiu tempo neatingeblajn por virinoj. Ili komencis labori en diversaj profesioj, ofte tre malutilaj por ilia sano. ekzemple en paper-metalvestaj- kaj keramik-industrioj, kiuj estas laŭ la opinio de kuracistoj la plej danĝeraj por virina organismo. Ili fariĝis ne nur tramkonduktorinoj, portistinoj, ŝuistinoj, soldatoj, sed atingis altajn postenojn, kiel malsanulejdirektoroj, fervojestroj, diplomatoj, eĉ ministroj. Miloj da virinoj tute bone anstataŭis virojn en lernejoj, bankoj, diversaj oficejoj, laboris kiel kuracistoj, aviadistoj, ĥemistoj, apotekistoj, advokatoj kaj iuĝistoj. La ebleco akiri bonajn, sufiĉe alte pagatajn, postenojn kuraciĝis la virinan mondon.

Multaj kaŭzoj igis la plimulton da virinoj profesie aktivaj: la aspiro al memstareco, la volo posedi de si mem perlaboritan monon kaj sendependan pozicion, fine — ĉe edzinigintaj virinoj

— nesufiĉaj laborprofitoj de l' edzo, la mizero, la malsato, minacanta al la familio. Sed por atingi bonan postenon, tiun feliĉan celon, oni devis lerni kaj ricevi universitan diplomon. Do ĉiuj knabinoj post gimnazilerado ĵetis sin al superaj studoj. Ofte sen speciala talento, sen sano por longa kaj fortelĉerpa lernado, sen vera emo. Ili elektis tiun aŭ alian fakon, nec esti kune kunamikinoj aŭ kunuloj. Grandan rolon en tiu fervoro, por la supera instruado ludis la elsonĝita libereco kaj ŝajeco de l' studenta vivo. Ĉiutारे la nombro da studentinoj pligrandiĝis, la universitat - lernado fariĝis modo.

Sed iom post iom la tempoj ŝanĝiĝis, kaj la ŝancoj ricevi bonan postenon post longa, multekosta, kaj lacia studado fariĝis malfacilaj. La viroj revenis kaj reprenis siajn okupojn, komenciĝis la krizo kaj forpelis grandan nombron da virinoj de ŝtatificejoj, de l' komercio kaj industrio. Ili fariĝis senlaborulinoj malkuraĝigitaj per la senbezono de iliaj fortostreĉoj kaj diplomoj.

Komenciĝis stranga simptomo: reiro de (daŭrigo sur p. 7.).

junaj knabinoj de l' alta lernado al longtempe malestimata mastrumstudo. Ĉi-jare en aŭgusto okazis en Berlino la 5-a internacia mastrumadkongreso. Estis reprezentataj 24 landoj de iliaj delegitinoj. El iliaj paroladoj montris sin, ke en ĉiuj tiuj landoj la nombro de studentinoj en universitatoj videble malpligrandiĝis kaj paralele al tio kreskis la nombro da lernantinoj en mastrumlernejoj.

Dum solena malfermo de tiu kongreso parolis brilanta oratorino, gvidantino de germanaj virinoj s-ino Scholtz - Klink, kiu diris, ke nova Germanujo celas direkti ĉiujn virinajn talentojn kaj fortojn nur al la hejmo kaj familio, ĉar ili estas la ŝtatfundamento. Vane la franca delegitino respondis, ke la virino ne devas haltigi siajn talentojn kaj intelektan ebolon sur la sojlo de l' hejmo, vane elŝovis la saman opinion la delegitinoj de 8 diversaj nacioj (inter ili la pola)... En la voĉdonado venkis la propono de s-ino Scholtz - Klink.

En la ekspozicio, aranĝita dum la berlina kongreso, oni povis observi tre multe da bildoj prezentantaj patrinojn kun infanoj, statuoj je la sama temo, kaj artaj reproduktadoj de l' patrino. Ĉie surskriboj kaj signaldiroj, ke la virino devas esti nur gardistino de familia kulto kaj kutimo.

Legante internaciajn virinajn gazetojn, oni vidas, ke ne nur knabinoj direktas sin nun volonte al la mastrumstudoj, sed ke en multaj ŝtatoj tiu lernado estas deviga. En Holando ne estas eble edziniĝi sen mastrumatesto. Por atingi tiun aleston, oni devas ne nur ellerni kuiri kaj lavi sed ankaŭ flegi infanojn kaj malsanulojn. En Germanujo la mastrumlernado estas ligita kun sociaj studoj. Kvantam tiu lernado ne estas deviga, sen ĝia atesto la germana knabino povas nek eniri universitaton, nek ricevi ŝtatpostemon. La lernado daŭras minimume $\frac{1}{2}$ da jaro.

Memkompreneble la mastrumstudoj ne povas satigi la bezonon de perlaboro ĉe la virinoj. Ankaŭ ne ĉiuj povas edziniĝi kaj utiligi sian sciencan propran hejmon. La mastrumlernado devis krei novajn profesiojn, novajn perlaborvojn kaj kreis ilin.

En skandinaviaj landoj, kie la servistaro estas malofita kaj multekosta, aperis mastrum-fratinoj, inteligentaj virinoj, preparitaj por anstataŭi la hejmsinjorinon en okazo de ŝia malsano, subita forvojaĝo, aŭ bezono forlasi ŝian hejmon por sia profesia laboro. Ili venadas eĉ nur por kelkaj tagoj.

En Francujo kreiĝis institucio de hejmkonsilantinoj por junaj paroj aŭ aliaj personoj, volantaj posedi elegantan, praktike aranĝitan hejmon sen embaraso kaj perdo de tempo. Tiuj konsilantinoj ne nur posedas bonegan guston, sed ankaŭ precizan komercajkonon. Ili ne nur aranĝas gustplenan hejmon, sed instruas al la nova edzino modernan labororganizon, tiun arton gvidi la hejmon bone kaj ŝpare. Interalie ili aranĝas kalkullibrojn por enskribi ĉiujn hejmelspezojn, ĉar ofte tia librotenado estas tre utila por reteni la hejmbudĝeton en ekvilibro.

En modernaj mastrumlernejoj estas ankaŭ instruita arto gvidi hotelojn kaj pensionojn; memkompreneble preferon havas ĉi tie lernantinoj, posedantaj almenaŭ tri eŭropajn lingvojn.

Aperis ankaŭ dietetikistinoj, fake gvidantaj la parton de l' dieta nutrado kaj kuirado en malsanulejoj, sanatorioj kaj pensionoj. Ili havas titolon de „asistantinoj de l' dietetiko“ kaj devas posedi la scion kuiri laŭ la plej novaj medicinspertoj, prepari krudajn vitaminmanĝaĵojn, konji la anatomion, fiziologion kaj nutrohemion.

Tiu nova „vento“, kiu komencis blovi en la virina mondo estas saĝa konsekvenco de l' ŝanĝo, kiun alportas nia nuna vivo.

Certe ne ĉiuj virinoj forlasos universitatstudojn. Restos ankoraŭ tre multe da vere lertaj, sciemaj, talentplenaj kiuj uzos siajn talentojn por la bono de l' patrujo, aŭ eĉ por la tuta homaro, kiel s-ino Curie - Skłodowska. Estus neta domaĝo detranci al ili la flugilojn, devigi ilin nur al la hejmlaborado. Laŭ la raporto de l' angla patent-oficejo — 400 novaj eltrovaĵoj devenas de virinoj. Antaŭe eltrovaĵoj estis tre maloftaj, nun kreskis ilia nombro videble. Oni povas observi, ke virinaj eltrovaĵoj havas signon de praktikeco kaj adapto al hejmaj bezonoj. Inter aliaj oni vidas natentoin nor pli bonigitaj, novaj kuirmasinoj kaj kuiraranĝoj, por kunmetebaj tabloj kaj aliaj mebloj, aparatoj por kolorigi kaj sekigi harojn k. t. p. Sed troviĝas ankaŭ pli gravaj eltrovaĵoj teknikaj kaj ĥem'aj.

Talantaj, kapablaj virinoj ĉiam devas elekti vojon de altaj studoj, sed la aliaj, kiuj ne posedas difinitan, precizan talenton, bonegan sanon por longaj studoj, kaj sufiĉe da mono por atendi — ofte dum longa tempo ĝis venos la konvena posteno — tiuj virinoj direktu sin al la mastrumlernado, kie povas esti bonege utiligita la celo, al kiu kreis ilin la ĉiam saĝa naturo.

MARJA KONOPNICKA.

LA FATO DE STAĤ.

Dum militon reĝ' veturis,
al li multaj flatoj kuris;
flirtis flagoj gajajn kantojn,
ke li venku kontraŭantojn!

Dum Staĥ iris al bataloj,
sonis al li cerealoj,
adiaŭis lin la spikoj,
familio kaj amikoj!
En milito saĝoj bruas,
de soldatoj sango fluas,
plej heroe reĝ' batalas,
sed simpluloj pleje falas!

Staĥ — karesa formo de la nomo Staniŝlao.

JAN LEMAŬSKI.

Najbaroj.

Fabeleto.

En nezorgata ĝardeno, ne tro malproksime de tie ĉi kaj ne tre proksime, en loko, kie antaŭe estis gazono kaj hodiaŭ abunde ekregis malbonherboj, inter aliaj verdajoj kreskis lilio.

Najbaroj kaj najbarinoj kiel: kardo, hiskiamo, lapo, poligonoj, urtikoj, cikuto, ekvizetoj, kaj aliaj personoj, komence konsideris lilion sia kuzino kaj ili povis erari rigardante ŝiajn foliojn dikajn kaj ordinare verdajn. Ili ĉirkaŭis ŝin eĉ kun certa zorgemo: ĉiu herbaĉo sentigante al ŝi ioman superecon konsilis tion kaj ion. Kardo — ke ŝi kreskigu sur si pikilojn; urtiko — ke ŝi klopodu formi en siaj folioj kiom eble plej multe da veneno; plantago — ke da viviga suko; laktuko demandis lilion pri ŝia floro kaj laŭdis sian lanugon; lapo pretekstante ŝirmi lilion forprenadis al ŝi sunon k. t. p. Tamen fine, kvankam kun granda peno, lilio superis la herbaĉojn kaj disvolvis floron — blankan, grandan, altkreskan kalikon.

Tiam ekbolis en la ĉirkaŭantaro. Ĉiujn herbaĉojn indignigis tiu senhonta

Flirtas flagoj post batalo,
ho, la fato vilaĝana!
Staĥ mortvunda hospitalon,
reĝ' revenis urbon sana.

Dum al pordo la kastela
pompveturis reĝ' kruela,
kampanoloj gaje sonis,
Reĝan Moŝton fanfaronis,
Staĥon oni metis kavon,
de vund' kreskis ruĝ-papavo,
ploris orfoj, arboj bruis,
de vidvino larmoj fluus.

Tradukis Józef Bociek.

grandeco de l' kaliko kaj tiu senmakula ĝia blankeco. Kiel oni povas ion similan...! Kiel ŝi estas aroganta kaj samtempe malpraktika! De malproksime tio frapas ĉies okulojn kaj ofendas, treege ofendas...

Tiel parolis la malbonherboj kaj interne deziris al lilio morton, ĉar jam vere ŝi tro humiligis ilian fieracon per la malofita beleco de sia kresko kaj floro.

Kiam multaj ion deziras, tio fariĝas — des pli, kiam ĉiuj. Tial mallongan vivon ĝuis lilio.

En la forlasitan ĝardenon tra disfalta barilo invadis foje azeno. Vigla rigardo de tiu besto komencis serĉi ian UTILON kaj baldaŭ rimarkis la ŝatatan herbaĉon — kardon. Vivece li paŝis en tiu direkto kaj rapide komencis pinĉi la dornajn foliojn de l' kardo. Ĉar en tiu agado malhelpis lin lilio tikletante liajn naztruojn, li rompis ŝin, piedfrapis kaj surtrotis; plenmanĝinte li ekblekis — kaj foriris.

El la pola esperantigis
Baroko.

FELIĈAN NOVAN JARON!!

Feliĉan Novan Jaron,
Karaj Samideanoj!
Proksimaj aŭ vivantaj
Trans montoj, oceanoj...

Estu ĝi kiel suno
Lumega kaj brilanta,
Bonega kiel pano,
Kiel patrin' amanta.

Ne sciu ĝi entule
Malbonon kaj malĝojon,
Montru ĝi al homaro
Feliĉan novan vojon.

Proksimaj aŭ vivantaj
Trans montoj, oceanoj,
Feliĉan Jaron Novan,
Karaj Samideanoj!

LENA.

„LA LASTA KISO“.

S-ro Jan Kaszycki el Kraków apartenis al la plej fervoraj samideanoj. Por honorigi lian memoron, ni represas la ĉisuban legendon, trovitan en restinta post li paperaro. La traduko posedas daton: 5. IV. 1911.

Red.

Estis la antaŭvespera horo, kiam al vilao Oranga en antaŭurbo de Jeruzalem alvenis juna lernanto de la Majstro, Johano, kaj demandis pri sia fianĉino. La juna knabino alkuris al li.

— Ni iru al la laŭbo mirta — alparolis Johanino — tie ni restos tute solaj kaj ni havos belegan vidlokon al la lago.

Johano ne bezonis demandi la fianĉinon pri la impresoj, kiun sur ŝin faris la diraĵoj kaj mirindaĵoj de Jezuo, li sciis ja, ke ŝi ensorbadis ĉiun vorton, fiksigardante la vizaĝon de la Majstro.

— Johano — diris la knabino — Jezuo nomis vin mia instruanto. Vi instru al mi pri saĝeco kaj amo.

— Fratino plej aminda — rediris li al ŝi — ju pli multe mi rigardas al la filo de Mario, ju pli mi estas konvinkita, ke li estas sendita el la ĉielo, por montri al ni la veron kaj vojon al la savo, des pli intime mi kredas, ke li estas Mesiŝo, des pli mi amas lin; kore sindona estas mi al li, kaj lia amo tute ŝanĝas min. Ankaŭ vin, kara Johanino, mi amas tre kore, sed jam alie, ol antaŭe. Via ridado kaj via rigardo ravas min, sed ne alforĝadas plu miajn pensojn, ĉar ili enpenetras pli profunden ol en fundon de okuloj viaj en kiuj mi iam dronadis kun tuta koro. Mi vidas nun animon vian kiel tra kristala tavolo en la brilaĵo eliganta ĉiufanken el via frunto. Kaj deziregas mi vidi animon vian ĉiam pli bela, ĉiam pli feliĉa. Mi ŝcias, ke sole Jezuo povos doni al ĝi tiun idealan belecon kaj plenan feliĉecon.

— KREDU al mi, Johano, ankoraŭ neniam estis mia koro kun la via en tiel tutplena akordiĝo — rediris Johanino. — De la momento, kiam mi ekaŭdis la Majstron vian, la Majstron nian, mi ne estas plu tia, kia mi estis antaŭe. Ŝajnas al mi, ke mi ne paŝas surtere, sed, ke mi supren levigados al la nekonataj landoj, plenaj de pensoj tute novaj por mi. Mi ankaŭ amas vin ĉiam — ŝajnas al mi ĉiam pli kaj pli ol iam ajn, sed via juneco, via forto, via plensincera rigardo, estinta iame mia ĝojo kaj gloro, pa-

ligas hodiaŭ kontraŭ la nevidebla brilo, pri kiu mi revas por vi... kaj mi per okulo de imago vidas la animon vian de ĝi ĉirkaŭradiatan.

Jen la amo al Jezuo suprenlevas kaj grandigas vin en miaj okuloj. Tiu amo kaŭzos, ke vi estos io pli ol homo, ĝi donos al vi flugilojn, por ke vi altiĝu ĉis la Suno Dieca. Ĉu vi memoras, Johano, kion vi diris al mi en Betsaido, dum nia adiaŭtago, pri aglo, de vi plej amata birdo? Jen mi diros al vi: Vi estos aglo, kaj suno via — estos Jezuo.

Johano silentis enpensinta en tiuj dolĉaj por li paroloj, kiujn akompanis ritma bruo de la maro. Post momento li reparolis:

— La Majstro diris al ni iun tagon: „Benataj estas, kiuj havas ĉastan koron, ĉar ili vidos Dion kaj post la Ŝafido Dia ili eniros la regnon ĉielan“. Tiu Ŝafido estas Jezuo; tion diris Johano Baptisto. Ĉiutage mi komprenas pli precize la signifon de tiuj ĉi vortoj.

Ĉu vi volas, mia amata, ke ni eniru post Li en la regnon ĉielan? Ĉu vi volas, ke ni pro Lia amo faru oferon el niaj deziroj pri kunigo nia sur la tero kaj por ke ni servu al Jezuo en ĉasteco ĝis la morto?...

En okuloj de Johanino ekbrilis la larmino.

— Johano — ŝi rediris — mi ankaŭ pensis pri tio. Profunde en la animo mi aŭdas la respondon al via demando, mi aŭdas la voĉon, ordonanta al mi sekvi la Ŝafidon. Mi suferas pro tio, ke mi devas rezigni je niaj junecaj revaĵoj. Mi suferas tiel forte, kvazaŭ mi per propraj manoj la koron el brusto elŝirus. Sed puŝas min ia nevidebla forto kaj igas min tiel agi. Mi deziregas sekvi la Ŝafidon sur la vojo, sur kiun li alvokas min.

Nu tiel, Johano, ni amos Jezumon kaj ni amos nin reciproke per la ĝefrata amo, persistante en la ĉasteco ĝis la morto...

— Ĝis la morto — reparolis la iuna apostolo. Johanino ekpaliĝis. La brusto ŝia levigadis de mallaltigata plorĝemo. Ŝi deziris fari el si oferon, ŝi deziris tion fari kun plena decido de sia forta volo, sed ŝi estis tamen deprimata. Tute tremante, ŝi apogiĝis la kapon sur la brakon de Johano. La junulo metis sur ŝian fronton la kison plenan de respekto kaj sentema inkliniĝo.

— La lasta kiso mia, Johanino — diris la junulo.

— Jes, kara frato; de nun la buŝoj niaj kisos nur la piedojn de la Majstro!..

Ili ŝtariĝis plenigitaj je la konfido.
Eksilentis la ventego... La trankvilo senlima plenigis iliajn korojn.

Tradukis Jan Kaszycki.



TEATRO KAJ FILMO



AL ĈIUJ REDAKCIOJ DE ESPERANTO - GAZETOJ.

Karaj gesamideanoj!

Ne tre ofte okazas, ke ni povas fari vere efikan propagandon por nia afero. Sed nun estas tiu bonŝanco, kiun ni volas kiel eble plej multe eluzi — tial ni petas: bonvolu helpi nin.

Unu el ĉefaj redaktoroj de la plej grava pola gazeteldonejo, ampleksanta sep diversajn revuojn, verkis tre bone sukcesintan teatraĵon. Ni deziregas pere de Esperanto fari al la teatraĵo kiel eble plej fortan propagandon, kiun, cetere, ĝi

plene meritas, por tiamaniere akiri la simpatian de tiu gravega eldonejo por Esp. Ni tre varme petas ĉiujn Esp.-redakciojn enpresigi la ĉi-suban recenzon kun la aldonita instigo, por ke ni povu pruvi la efikecon de propagando per Esperanto. Bonvolu sendi al ni koncernan n-ron de la E.-gazeto.

Bonvolu akcepti korean antaŭdankon de
Pollanda Esperanto-Delegitaro
Kraków, Lubicz 34.

„Robinzon Kruzoe“ venkas la teatran krizon.

Ĝi estis nekutima koncepto, prezenti sur scenejo aventurojn de la plej ŝatata heroo de nia juneco. Faris tion du aŭtoroj el Krakovo (Pollando), konata felietonisto s-ro Tommy kaj reĝisorino f-ino Bilizanka. Tiu verko, prezentita sur scenejo de granda Krakova teatro, estis akceptata kun eksterordinara, entuziasme favora kritiko: „Guplena spektaklo“, „nova epoko en la historio de repertuaro de infana dramo“, „la plej moderna teatraĵo, kiun oni vidis sur scenejo de la Krakova teatro“ — kaj tiu teatro estas ja la plej reprezentativa scenejo de Pollando.

Tiu ĉi teatraĵo havas malmulte da komunaj trajtoj kun la verko de De Foe. La malnova Robinzono estas por la aŭtoroj saltotabulo por funkciigi la fantazion. Lernejoj infanoj kun sia komandanto Joĉjo, kiun ili nomas Robinzono, konstruas ŝipon el la objektoj, kiujn ili trovas en la klasocambro kaj sur ĝi ili ekveturas en la imagatan vojaĝon. Reale miksiĝas kun fantazio kaj grotesko, formante tutajon plenan de ĉarmo. La ŝipopro de la spektaklo estas la juĝo pri malbona ĵako, rivalo de Robizono. La tribunalo formas la tuta ĉeestantaro. Malfacile estus priskribi, kio fariĝas, kun kia fervoro kaj kiel honeste la ĉeestantaro juĝas! Kontakton kun la ĉeestantaro faciligas bonega kaj sprita konferencado.

Ankoraŭ unu novaĵo: la teatraĵon ludas preskaŭ nur amatoroj, dekelkjaraj

knaboj. Oni nepre devus vidi, kiel ili tion faras: paliĝas pro envio maljunaj, sagacaj histrionoj. Eĉ ne estas necese mencii, ke Robinzono venkis ankaŭ la teatran krizon.

La teatraĵo estos nun prezentata sur ĉiuj polaj scenejoj, ĝi estas tradukata en la lingvojn: germana, hungara, rumana, nederlanda kaj hebrea.

Ni petas ĉiujn estimatajn gelegantojn de nia gazeto, - tradukinte la recenzon nacilingven, aperigi ĝin en la naciaj ĵurnaloj, kaj 1 — pleje dezirinda estus 2 — ekzemplero(j)n de la koncerna numero sendi al la adreso de Pollanda Esperanto-Delegitaro, Kraków, Lubicz 34.

La afero posedas grandegan signifon, tial klopodu fari ĉion plej eblan.

La Redakcio.

Okaze de la ĵarŝanĝo la Redakcio kaj la Administracio de Pola Esperantisto prezentas siajn plej sincerajn bondezirojn al ĉiuj siaj Abonantoj, Legantoj kaj Amikoj. La jaro 1935 alportu al vi, karaj Samideanoj, multe da feliĉo kaj prospero!

— Diru sinjorino Domdrakeg, kial via edzo tute ne plu vizitas la grupon?

— Li nun restas hejme ĉiuvespere kaj pasigas la tempon laŭ propra plaĉo, tie kiel mi deziras. (W.)

POL — KAJ EKSTERLANDA KRONIKO

Bydgoszcz. El la lerte redaktata „Ligilo de la Esp-istoj en Bydgoszcz” n-ro 5 (23) ni ekscias, ke la tieaj grupoj vigne laboras, aranĝante regulajn kunvenojn kaj klubvesperojn kun interesa programo. Prof. Sygnarski gvidas kurson. La 13. XII. okazis bone sukcesa „Zamenhofvespero”.

„MARVESPERO” EN LWÓW.

Multe impresis la polajn Esp-istojn la giganta, ondanta maro, dum la ŝipekskurso, gvidita de nia altestimata Sinjoro Prof. Dr. Odo Bujwid al belega Esperanto-kongreso en Stockholm.

Sub ĉi impresoj, kreiĝis en Lwów

Marvespero

per la laboro de niaj konataj aranĝantoj de grandstilaj Literatur - Artistaj Vesperoj, s-ro Henryk Schnützer kaj f-ino Minuška Mantel.

La Vesperon, malfermis Univ. Profesoro Dr. Adolf Chybiński, parolante pri „la maro en la muziko”.

Univ. Profesoro Dr. August Zierhoffer faris interesan prelegon pri la „signifo de la marbordo por Pollando”.

Surpaŝis la scenejon la ĉarma opera kantistino s-ino Cecylja Otto, kantinte per brila voĉo markantojn, majstre pianakompanita de la fama radiopianistino, Profesorino Henryka Sucherowa.

Oni kore salutis nian Samideanon Prokuroron Dr. Julian Zajac, kies agrabla voĉo ĝojigis, lerte pianakompanita de lia filo mgr. Jan Zajac.

Recitis en lerta maniero la juna, simpata fraŭlino Marja Siderówna, sinjorino Janicka prelegis leteron de s-ro Henryk Schnützer „Impreso pri la maro”, multe aplaŭdita de la aŭdantaro.

En ĉiu kanto, parolado, muzikajo respeguliĝis la potenca, ŝaŭmanta, „malseka elemento”, nia Maro.

Sub la sperta gvido de nia fervora fraŭlino Laura Nadel, okazis belega Zamenhofa Vespero.

Nia klubprezidanto, Dr. Fels, faris solenan malferman paroladon, nia konata recitantino, Frl. Lola Blank deklamis belajn E-poemojn, multe aplaŭdite.

Infanetoj el E-kurso de f-ino Laura Nadel ludis teatraĵon, mirigante la aŭskultantaron per la modelaj prononcoj kaj ludlerteco. La bonsukcesa Vespero trovis fortan aplaŭdon.

La 3. I. parolis nia Prezidanto Dr. Fels pri la „Kataluna Antologio” kaj la

verko de Nyssen „Bonhumoro”, laŭtelegante partojn el ambaŭ libroj.

Aro da ge-anoj vizitis la blindan faman pianiston S-anon Imre Ungar, kiu koncertis en la urbo. Fino Minuška Mantel intervjuis lin por la gazeto „Heroldo de Esperanto”.

Kursojn gvidas frl. Laura Nadel kaj S-ro N. Herr.

Warszawa. Esperanta Sekcio de Pola Touring-Klubo intencas en plej baldaŭa tempo aranĝi „Italan Vesperon” okaze de XXVII Universala Kongreso en Roma.

„Antena”, organo de Pola Radio, aperigis en N. 7, la 18-an de novembro 1934, artikolon de Halina Vinstin s. t. „Zamenhof kaj lia verko”.

Wilno. La „Vilna Esperantista Societo Universo” okazigis akademion por solenhoni la 75-an Datrevenon de l’ naskiĝo de Dro L. L. Zamenhof. La prezidanto — K. Gersäter malfermis la akademion. Mgr. E. Sindelman faris prelegon „Pri la idearo de Dro Zamenhof” kaj en sia temata vorto K. Gersäter analizis Dron Z. kiel idealon finante per originala ĝis nun nepresita versaĵo de l’ rusa poeto G. Daŝkin, s.t. „Je l’ memoro de l’ Majstro”. La dua parto konsistis el esperanta kaj diversa muziko kaj amuzoj ĝis la kvara horo nokte. Ĉeestis 150 personoj, elmontrintaj grandan intereson por nia movado. — En la sama tago preskaŭ ĉiuj gazetoj aperigis artikolojn pri Dro Z. (kun lia bildo) verkitajn de S-noj Gersäter, Milakowski kaj aliaj. Malgraŭ diversaj kaj ofte gravaj malhelnoj, nia societo kreskas kaj pligrandiĝas en Vilno.

New York. La Nova Yorka Esperanto Asocio, dum la nuniara naskiĝefesto de nia kara Majstro, invitis inter aliaj ankaŭ la polan ĝeneralan konsulon de tiu ĉi urbego. Pro lia foresto anstataŭis lin la ĝenerala sekretario de la konsulejo S-ino Zand, kiu en tre varmaj vortoj priparolis la vivon de D-ro Zamenhof kiel lingvisto, bonkora ku-acisto kaj precipe homarano. Ŝi bedaŭris, ke malgraŭ lia grandeco li estas ne sufiĉe konata en la mondo. S-ino Zand ankaŭ parolis pri pola literaturo, arto, moroj, kutimoj, lingvo kaj pri la influo de pola kulturo al fondiĝo de Esperanto. Fine ŝi diris, ke alvenis al la naskiĝefesto kiel nur rennecantanto de la pola registaro, sed ŝi

sentas, ke tiu kunveno konvertigis ŝin en samideanino.

Parolis ankaŭ la prezidanto de la NYEA, s-ro Aby, pri kongresaj paroladoj de D-ro Zamenhof; la vicprezidentino s-ino Fellowss, pri personaj impresoj de Zamenhof, dum oni kongresis en Washington; la honora prezidentino, s-ino Ford, pri la dubla edziĝo de Zamenhof, kun la amata fianĉino Silber-

nik kaj kun Esperanto, ĉar tiu edziĝo helpis lin finance la aperon de la unuaj libretoj de la Lingvo Internacia. Fine parolis la Ĉefdelegito de UEA en Nova Yorko, s-o Berthold Schmidt, pri la genia junulo Zamenhof. Finiĝis la impresplena kunveno kantante „La Esperon” kun la talenta muzika akompano de la Ĉefdelegito.

M. Jagoda.

R E C E N Z O J.

ANTONI SŁONIMSKI: *Mia vojaĝo en Sovetio.* El la pola originalo tradukis S. Grenkamp - Kornfeld 1934. Eldonis „Literatura Mondo”. Budapeŝt. Paĝoj 142.

Interesa libro, kiu donas al ni plenan enigardon en la nuntempan Sovetion. Unuspire oni legas ĝin, tiel agrable ĝi estas verkita.

Pri la lingvaĵo de la traduko mem mi plenumas iom malagrablan devon de recenzisto, al kiu ne tute plaĉas tial esprimoj kiel ekz. sur p. 1. nafto anst. la simpla Zamenhofa petrolo. Ja la homoj staras vicorde ne por nafto, sed por lamppetrolo, ĉu ne? „Ĉu — ĉu” estas malĝuste uzata anst. „ĉu — aŭ”. Sur p. 9 „povo” anst. aŭtoritato, registaro aŭ reĝimo. Sampaĝe: „perfidi” anst. malkaŝi, (el)montri aŭ malkovri. Sur p. 15. „prikalkulita” estas laŭvorta traduko de pola obliczony; la frazo devas teksti: grandegaj fenestroj servas por..., aŭ: celas doni (liveri) maksimumon da lumo kaj aero (ne: de...) Sampaĝe etaĝero (?).

Sur p. 57 vitrino (?). Sur p. 59 „certa” anst. „iu”. Sampaĝe: „tio estas la mversa flanko de tiu ĉi medalo”. Mi dubas ĉu ne-noloj komprenas.

Sur p. 127 mi preferas „mildigaj” anst. „malpligravigaj cirkonstancoj”.

Sur p. 77 „enua” anst. „enuiga”.

Sur p. 24 „bokaloj” (?).

Sur p. 33. „sakramenta” (well) (?) Sampaĝe „certe” anst. „verŝajne”.

Sur p. 80 „depostulo” anst. „repostulo”.

Sur p. 88. „rompis kun”, anst. „rompis la rilatojn kun”.

Sur p. 129. transportigo anst. transporto..

Malgraŭ la supraj riproĉetoj, da kiuj oni povas trovi pli multe, la traduko de s-o Grenkamp estas laŭdinda, ofte oni trovas tute bonajn esprimojn, konsiderante, ke laŭ ĉiaj ŝajnoj la tradukado estis farata iom rapide.

Dr. L. Dreher.

KATALOGO. Eldonis Literatura Mondo, Budapeŝt. Mester-u. 53. 48-paĝa. Formato 11,5x15 cm. Kun bele klisita, dukolora kovrilpaĝo. Enhavas krom multaj diverskoloraj bildoj, apartan mencion pri ĉiuj eldonaĵoj de Literatura Mondo kaj AELA kaj detalan prospekton por AELA 1935. SENPAGA.

Ĉiuj eldonaĵoj de LITERATURA MONDO vekas en mi fortan admiron. Tiu entrepreno estas io absolute senprecedenca en Esperantujo. Ĝi inundas la samideanaron per multego da valoraj libroj kaj eldonaĵoj. Kiam aliaj eldonejoj perdas la spiron pro la terura monda krizo, la eldonejo de Literatura Mondo eldonas, eldonas kaj eldonas. Ni ĝojas havi inter niaj vicoj tiel talentajn verkistojn kaj tradukistojn kiel tiuj, laborantaj en Literatura Mondo, ni ĝojas ankaŭ posedi tiel talentan eldoniston, kiel s-ro Bleier Vilmos. En la decembra n-ro de Pola Esp. vi povis elektadi inter la riĉa libraro, eldonita de Literatura Mondo. Nun ni ricevis belegan katalogon de la eldonaĵoj de Literatura Mondo. La katalogo, multkoloro ilustrita, prezentas en konciza formo ĉefajn trajtojn, resumojn de la eldonitaj verkoj. La eldonejo meritas kiel eble plej aktivan subtenon de ĉiuj samideanoj.

Pluajn eldonaĵojn de Lit. Mondo kiel: JELUŠIĆ: Cezaro (tr. Ivo Rotkvić);

DR. THEODOR HERZL: La juda ŝtato (tr. B. Selzer);

RAINER MARIA RILKE: Leteroj al juna poeto (tr. A. Münz) — ni recenzos en proksima n-ro de PE.

Krom tio aperis:

SVEDA ANTOLOGIO; Unua parto, vol. I. kaj

ENGHOLM: Al Torento; dua eldono — ambaŭ eldonis la Eld. Soc. Esper., Stockholm.

C. WALTER: Gaŭa lernolibro de Esperanto por sininstruo: eld. la aŭtoro.

PROSPEKTO de Rigi - First Hotelo (Svislando.)

JAN WOLSKI „Ĉu ĝi estas nur fabelo?” — Kooperativa junular-romano. El pola lingvo tradukis Kpt. Roman Dabrowski. Esperanta, de la aŭtoro kompletigita eldono. Eld. Esperanta Eldon-Kooperativo. Varsovio. 1935, pĝ. 176. (kun 12 originalaj ilustraĵoj kaj muzik-notoj).

Tiu libro estas ĝis nun unika en la tutmonda literaturo esperanta, ĉar: mankis ĝis nun entute literaturo kooperativa en la esperanto; tiu libro estas ne nur kooperativtendenca, sed ankaŭ esperanto-tendenca laŭvorte kaj laŭidee. Ĝia ĉefa ideo estas ja — interfratigo de junularo de ĉiuj landoj per „Tutmonda Asocio de Kooperativa Junularo”, tiel bele priskribita en la libro dum ĝia Internacia Kongreso sur supro de monto Magórka. Tiu Asocio uzas la lingvon internacian en siaj rilatoj, kion la aŭtoro substrekis speciale por la esperanta traduko. Pluaj virtoj, kiujn tiu romano instruas, estas: solidareco, kunagado, ĝoja laboro sen devigo, memregado en lernejoj kooperativaj ktp. Herooj de tiu rakonto estasaro da ĝejunuoj el diversaj lokoj de Polujo, kiuj, komencante de eta loka kooperativeto en lernejo, disvolvas ilin ĝis regiona, poste tutlanda — fine tutmonda ligo.

Fabulo humorplena, skribita per lingvo fluanta kiel la priskribitaj petolajoj de lerneja infanaro. Tiu fluanteco tute ne perdiĝis ĉe la traduko.

Dank’ al siaj belaj ilustraĵoj kaj muzik-notoj, detalaj „klarigoj” kaj ĝia nobla tendenco ĝi taŭgas perfekte kiel Kristnask-donaco por ĉiuj infanoj kaj ĝejunuoj.

Mendojn oni devas direkti al: „Esperanca Spółdzielnia Wydawnicza” Warszawa, Al. Jerozolimskie 101. Konto P.K.O. 6897, aŭ al la Redakcio de nia gazeto P.K.O. 406.606. **J. Z.**

„La Suda Kruco” mortis. Depost 15 jaroj aperadis organo de aŭstraliaj esperantistoj parte en esperanto, parte en angla lingvo. Kaj nun la 165 numero enhavas malĝojigan sciigon: pro monmanko la ĵurnalo ĉesas aperi. Al la redaktoro s-ro Reginald Banham kaj al la tuta aŭstralia samideanaro ni esprimas sincerajn kunsentojn. Ni esperas, ke en baldaŭa tempo ili sukcesos „La Sudan Krucon” aperigi denove.

En tiu adiaŭa n-ro aperis s. t. „El pola plumo” la artikolo de nia kunlaborantino „Lena” pri „Esp. — la plej taŭga traduklingvo” represita el P.E.

„Nia Gazeto”, aperanta en Nice (Francujo) bonege redaktata de s-roj Georges Avril kaj S. Grenkamp — Kornfeld, sukcesis gajni multe da simpatio kaj subteno de la tutmonda samideanaro. Enhavo de ĉiu n-ro estas vere tre interese, do ne mirige, ke la revuon sekvas ĝenerala aprobo de la legantaro. Ni kore al vi gratulas!

Esperanto voti (Estona Esperanto-slosilo). La libreto estas eldonita laŭ la konata modelo de Ĉefeĉ. Ĝi distingiĝas per tre bela preso kaj diligenta korekto. Ne konante la estonan lingvon, mi devis min limi je kontrolo de la Esperanto-teksto. La eldono vere plaĉas al mi.

La Redakcio de Pola Esperantisto kaj mi persone ricevis tiom da bondeziraĵoj okaze de la Novjaro, ke ni ne povas respondi al ĉiuj niaj Amikoj per separataj leteroj. Ni treege dankas al ili kaj petas ke ili bonvolu akcepti koregajn dankojn kaj reciprokajn bondeziraĵojn ne nur por ili persone sed por la disvolviĝo kaj kresko de nia komuna afero. Kelkaj leteroj tamen estis tiom plenaj de bonvolemo kaj simpatio por nia agado, ke ni sentas nian devon speciale danki al:

Fino Lidja Zamenhof (Francujo), S-o Prof. M. Suzuki (Japanujo), Ges-oj Martin Palsberg (Danujo), Ges-oj M. kaj P. Blaise kaj Esp. Rondo (Anglujo), S-o F. O. Lechmere-Oertel (Cyprus, Gekujo), Ges-oj Prof. Dr. M. kaj Sinjorino Soule (Ann Arbor University, Usono), S-o M. Jagoda (Brooklyn, Usono), Prof. Ing. G. Scholze (Reichenberg, Ĉeĥoslovakio), Ges-oj Holger Hansen kun Kirsten kaj Grete (Holbæk, Danujo), Ges-oj Goedecke, Ges-oj Merrick, S-o Gorges Avril (Nice, Francujo), S-o H. Rieck Plemper v. Balen (Nederlando), S-o S. Gremkamp (Paris, Francujo), S-o Prof. M. Sygnarski (Bydgoszcz), S-o B. Strelczyk, S-o E. Wiesenfeld, Fino H. Weinstein (Warszawa), S-o S. Szyk (Wilno).

O. Bujwid.

Geedziĝo. Ni gratulas kaj bondeziras al Ges-oj Gusta kaj Kal. Rosenblatt. Fraŭlino Gusta estas jam de longe nia laborema samideanino; ni esperas, ke de nun ili ambaŭ kunlaboros por nia afero.

O. B.

Abonujcie miesięcznik „Ondo de Daŭgava” i „Informoj de Estonio” w cenie zł. 2.20 rocznie. Abonament przyjmuje admin. „Pola Esperantisto”. Konto P. K. O. 406.660.

RADIO.

Ni prezentas pluan programon de Esperalegoj en polaj radiostacioj (precipe Kraków kaj Warszawa).

2. I. merkr. 21h30—21h40 Prof. dro O. Bujwid: Pri la Esp. traduko de „Quo vadis?”.

8. I. mardo 22h45—23h. Tad. Hodakowski: Interparoloj kun aŭskultantoj en Esperanto.

22. I. mardo 22h45—23h. Dir. Bol. Walewski: Belego de l' pola popolo muziko.

31. I. ĵaŭdo 22h45—23h. Prof. dro Zerndt: La lando de nigraj diamantoj (Supra Silezio).

12. II. mardo 22h45—23h. Tad. Hodakowski: Interparoloj kun aŭskultantoj en Esperanto.

26. II. mardo 22h45—23h. Dro Adam Gadomski: Polaj vojaĝistoj kaj malkovrintoj.

Samideanoj, bonvolu memori, ke devo de ĉiu konscia Esp-isto estas subteni la Esper.-prelegojn, sendante danskribaĵojn al Polskie Radio, Warszawa. Ne forgesu pri tio!!

GUSTIGO.

En novembro n-ro de P. E. la kompostisto forlasis en la artikolo: „Donaco al mia onklo”, tradukita esp-en de s-ino mgr-ino N. Klein, nomon de la aŭtoro, kiu estas JOSEPH ROTH.

Sammaniere ekmanis en la decembro n-ro de P. E. ĉe la artikolo s. t. „Julia Acker, la l'vova petrinstino” nomo de l'aŭtorino: F-INO M. MANTEL.

Ĝustigante tion, ni petas pardoni al ni tiujn kontraŭvolajn erarojn.

La Red.

PREMJA NA ROK 1935!

Kaŭdoj wplacajacy pełny roczny abonament „Pola Esperantisto” na rok 1935. do dnia 31. stycznia 1935. otrzyma jako bezpłatną premję miesięcznik „Ondo de Daŭgava” lub „Informoj de Estonio” (wedle wyboru) przez cały rok 1935. Poza to przysługuje premjowanemu prawo zaabonowania jednego z tych miesięczników po cenie ulgowej zł. 1.50 rocznie.

PRENUMERATA: rocznie zł. 8.—, półrocznie zł. 4.— Dla Towarzystw i grup esper. rocznie zł. 6.— Zagranicą: 6 fr. szw. Numer pojedynczy zł. 0.70. podwójny zł. 1.40.

OGŁOSZENIA: 1/2 strony zł. 30.— 1/4 strony zł. 15.— 1/8 strony zł. 10.— Korespondencja: maile ogłasz. z 10 słów (prócz adresu) zł. 1.—

REDAKCJO KAJ ADMINISTRACJO: KRAKOW, LUBICZ 34.

Nakładem

„Esperanckiej Spółdzielni Wydawniczej”

z odp. udz. w Warszawie,
Al. Jerozolimskie 101 (Konto P.K.O. 6897),
wysła

pierwsza w literaturze esperanckiej świata powieść spółdzielcza dla młodzieży p.t. „CZY TO BAJKA CZY NIE BAJKA”

z 12 oryg. ilustracjami i nutami Jana Wolskiego w przekładzie esperanckim Kpt. Romana Dąbrowskiego. Str. 176. Cena zł. 3.30 z przesyłką. Książka ta, wydana w oryginale polskim w r. 1925 przez jedną z najstarszych centralnych instytucji spółdzielczych w Polsce, doznała najprzychylniejszego przyjęcia w polskich sferach pedagogicznych, oraz M. W. R. i O. P. jako jedna z najlepszych powieści dla młodzieży o tendencjach społeczno-etycznych.

Dla zaawansowanych esperantystów — najrozkoszniejsza lektura. Dla początkujących — idealna sposobność łatwego nauczania się języka Esperanto dzięki istnieniu na składzie reszty oryginału polskiego, który spółdzielnia po niższej cenie zł. 2.50 wszystkim zamawiającym przekład esperancki — przesyła.

Dla wszystkich

najmilszy podarek na Gwiazdkę!

Zamówienia i wpłaty na konto P.K.O. 6897 prosimy kierować na wyżej podany adres, wzgl. do Adm. „Polsk. Esper.”, Kraków, Lubicz 34.
Konto P.K.O. 406.660.

AL ĈIUJ KUNLABORANTOJ!

Skribu klare sur unu flanko de l' papero, kun larĝaj margenoj. Sendu nur koncizajn raportojn!

ĈU VI JAM FINPAGIS LA ABONON POR J. 1934?!

SE NE

PAGU TUJ JE NIA KONTO

P. K. O. 406.660.

RENOVIGU LA ABONON

POR JARO 1935!

ABONO: jare zł. 8.—, duonjare zł. 4.—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj jure zł. 6.— Eksterlande 6 av. fr. Aparta numero zł. 0.70 duobla zł. 1.40.

ANONCOJ 1/2 paĝo zł. 30.— 1/4 paĝo zł. 15.— 1/8 paĝo zł. 10.— Korespondado: anonceto de 10 vortoj (krom adreso) zł. 1.—

KONTO P. K. O. NR. 406.660